

# LA LAMPIRO

61-a jaro, numero 161, 2020: 1



La intervuo kun Sten Johansson

# Machado de Assis

Fiere sin prezentas al la esperantistoj!




**Titolo:** Postmortaj rememoroj de Brás Cubas  
**Tradukis:** Paulo S. Viana  
**Eldonejo:** EASP, 2019  
**Formato:** 21 cm, 248 paĝoj

**Prezo:** R\$ 35,00



**Titolo:** Esav kaj Jakob  
**Tradukis:** Paulo S. Viana  
**Eldonejo:** EASP, 2019  
**Formato:** 21 cm, 272 paĝoj

**Prezo:** R\$ 35,00



**Titolo:** Dom Casmurro  
**Tradukis:** Paulo S. Viana  
**Eldonejo:** EASP, 2019  
**Formato:** 21 cm, 260 paĝoj

**Prezo:** R\$ 35,00

# LA LAMPIRO

61-a jaro, numero 161, 2020: 1

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

**Grafikaranĝo:** Cristovão Rocha Sousa

**Revizianto:** José Roberto Tenório



*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj*

### Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

### Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca

05041-000 São Paulo, SP - Brazilo

Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183

easp.org.br | contato@easp.br

### Jarkotizo por 2019

Simpla membro.....R\$ 150,00.

Subtena membro.....R\$ 300,00.

Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

### Dejoroj:

merkrede: 15h - 17h; jaŭde kaj

vendrede: 13h - 17h; sabate: 9h - 12h

(escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la

dejoro daŭras de la 9h ĝis la 18h)

### Estraro

**Prezidanto:** Genildo Martins Coelho

**Vicprezidanto:** Marcos Zlotovich

**1-a Sekretarino:** Anna Lobo de Carvalho

**2-a Sekretarino:** Sidnéia da Conceição Beall

**1-a Kasisto:** José Roberto Tenório

**2-a Kasistino:** Neide Aparecida de Freitas

**Propaganda Direktorino:** Cristina C. de Graaf

### Konsilantaro

Paulo Sérgio Viana, Audino Castelo Branco kaj

Aparecida de Souza Araújo

### Anstataŭantoj

José Mauro Progiantje kaj José Martins Coelho

# ENHAVO

LA  
Lampiro

9

Intervujo:  
Sten Johansson

17

Lingvaj Respondoj

5

Vortoj de La  
Prezidanto

11

Papero Ne Kaŭzas  
Senarbarigon

19

La Preĝo de la  
Maizo

6

Vortoj de la  
Redaktoro

13

Ruy Castro kaj  
Esperanto

21

La Du Papoj

7

75 Jaroj de Liberigo  
De la Mortotendaro  
Aŭŝvico-Birkenauo:  
La Deklaro de Ithraj

14

Printempo en la  
Aŭtuno: Ĉu Naiva  
Amrakonto?

22

Sveda Novelaro



## Vortoj de la prezidanto

Komenciĝas nova jaro kaj ni deziras al ĉiuj EASP-anoj prosperon kaj fruktodonan agadon por niaj lingvo kaj movado. Samtempe finiĝas la nuna estrara mandato, kaj ni jam de kelkaj monatoj tion rememorigis al vi. Ni do troviĝas en plena procedo de elekto de nova estraro. Ju pli aktive vi partoprenos en ĝi, des pli sana estos nia asocio.

Fine de ĉi tiu laborperiodo, la nuna estraro, kaj aparte mi mem, deziras danki la ricevitan apogon. Ni faris nian eblon por teni nian ŝtatan movadon vigla. Mi esperas, ke la proksima estraro atingos pli altajn sukcesojn ol ni povis fari. Al la nova gvidgrupo ni petas plenan apogon flanke de ĉiuj membroj!

Feliĉan Novjaron!



## Vortoj de la redaktoro

Karaj EASP-anoj kaj simpatiantoj,

Jen denove antaŭ vi kuŝas unu plia januara-februara numero de nia revuo. Mi ree dankas la kunlaborantojn, kiuj regule sendas siajn tekstojn kaj invitas aliajn (pli timemajn), ke ili ne hezitu aliĝi al tiu grupeto de kuraĝuloj. Ni bezonas viajn ideojn, viajn opiniojn, viajn analizojn pri nia Esperanta kulturo. Tia estas la esenco de nia movado: klerigo, kulturriĉigo, interŝanĝo de ideoj pri nia mondo, surbaze de neŭtraleco kaj toleremo. Estus interese same ke vi komentu kaj kritiku la enhavon de la revuo, por ke ni povu plibonigi ĝin.

Bonan legadon!

# 75 Jaroj de Liberigo De la Mortotendaro Aŭŝvico- Birkenaŭo: La Deklaro de Ihra

IVAN EIDT COLLING

IECOLLING@YAHOO.COM.BR - DEPAC/UFPR, CELIN/UFPR

La mortotendaro Aŭŝvico-Birkenaŭo estis konstruita de okupaciantaj nazioj en la pola urbo Oświęcim [oŝvjĔĉim] kaj en la vilaĝo Brzezinka [bĵejInka], kies nomoj estis germanigitaj respektive kiel Auschwitz kaj Birkenau. La ejo estas peza, hontiga memorigaĵo pri la homa kapablo uzi konojn, sciencan, teknologion por agi sovaĝe, kruele. Ĝi estis liberigita de la Ruĝa Armeo la 27-an de Januaro 1945.

En 1998 pro iniciato de la sveda ĉefministro Göran Persson estis fondita IHRA – Internacia Alianco por la Memoro de Holokaŭsto, kies fonda dokumento estas la Deklaro de Stokholmo, el la jaro 2000. La 1-an de Novembro 2005 Unuiĝintaj Nacioj difinis la 27-an de Januaro kiel Internacian Tagon por la Memoro de la Viktimoj de Holokaŭsto.

Ĉi-jare, la 19-an de Januaro, okazis en Bruselo konferenco de IHRA, dum kiu, sub la prezido de Jean Asselborn, Ministro pri Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Luksemburgio, ministroj kaj reprezentantoj de 35 landoj aprobis 14-alinean deklaron, kies teksto legeblas sube (la originala teksto, en la angla, troviĝas ĉe:

<<https://www.holocaustremembrance.com/news-archive/ihra-2020-ministerial-declaration>>

Registrante la 75-an datrevenon de la liberigo de germanaj naziaj koncentrejoj kaj ekstermejoj kaj de aliaj lokoj de persekuto kaj murdo, ni, la Altaj Registraj Reprezentantoj de la Membroŝtatoj de Internacia Alianco por la Memoro de Holokaŭsto (IHRA), honoras la viktimojn kaj postvivantojn de Holokaŭsto (Ŝoaho), kiu superverŝis la judan popolon. Ni honoras ankaŭ la viktimojn kaj postvivantojn de la genocido de romaoj kaj de aliaj, kiuj estis persekutataj. Ni promesas neniam forgesi tiujn, kiuj rezistis naziojn, kaj tiujn, kiuj protektis aŭ savis siajn kunhomojn. Hodiaŭ la mondo ankoraŭ alfrontas genocidon, militkrimojn, etnan purigadon kaj krimojn kontraŭ la homaro samkiel daŭrajn minacojn kontraŭ plurecaj, demokratiaj kaj inkluzivecaj socioj.

Kun malĝojo vidante la forpason de la postvivanta generacio, ni, la IHRA-Membroŝtatoj:

1) reasertas nian neskueblan subtenon al la Deklaro de la

Internacia Forumo de Stokholmo (2000), la fonda dokumento de IHRA;

2) promesas al la viktimoj kaj postvivantoj, ke ili neniam estos forgesitaj, kaj ke ilia heredaĵo restos vivanta;

3) emfazas, ke la memoro de ses milionoj de judaj viktimoj de Holokaŭsto estas respondeco ne nur de registaroj, sed de socioj kiel tutajoj;

4) memorigas la genocidon de romaoj. Ni kun ĉagreno agnoskas, ke la neglekto de ĉi tiu genocido alportis sian parton al antaŭjuĝo kaj diskriminacio, kiun multaj romaaj komunumoj spertas ankoraŭ hodiaŭ;

5) honoras ĉiujn, kiuj rezistis la naziojn, ĉefe la Justulojn inter la Popoloj, kaj aliajn, kiuj protektis aŭ strebis savi endanĝerigitajn. Ilia sindonema kuraĝo devus inspiri nin ĉiujn defendi la dignon de ĉiu homo;

6) esprimas nian profundan zorgon pro la kreskanta antisemitismo;

7) akceptas nian respondecon kiel registaroj daŭre kune labori kontraŭ la neado kaj la misprezento de Holokaŭsto, kontraŭ antisemitismo, kaj kontraŭ ĉiuj formoj de rasismo kaj diskriminacio, kiuj subfosas fundamentajn demokratiajn principojn. Ni laboras ligite kun spertuloj, kun civila socio kaj kun niaj internaciaj partneroj por antaŭenigi tiujn celojn;

8) kondukas fortostreĉojn celante antaŭenigi edukadon, memoron kaj esploron pri Holokaŭsto kaj genocido de romaoj por kontraŭbatali la influon de misprezentoj de historio, diskurso de malamo kaj incito al perforto kaj malamo;

9) sekurigas la historian registron de

Holokaŭsto, de la genocido de romaoj kaj de la persekuto al aliaj viktimoj fare de nazia Germanio, de ties faŝismaj kaj ekstreme naciismaj partneroj kaj de aliaj kunlaborantoj partoprenantaj en tiuj krimoj;

10) substrekas la gravecon trovi, konservi kaj disponigi arkivajn materialojn, atestojn kaj aŭtentajn ejojn por edukaj, memorigaj kaj espoloraj celoj;

11) kuraĝigas ĉiujn landojn kaj sociojn sin klini super siaj respektivaj pasintecoj kun malferma kaj preciza pritraktado de la historia registro;

12) laŭdas klopodojn de registaroj kaj de civila socio por memorigi Holokaŭston kaj kunhavigas bonajn spertojn;

13) rekonas, ke la kompreno de la senprecedenca naturo de Holokaŭsto estas esenca por antaŭmalhelpi genocidon kaj abomenindajn amasajn krimojn. La fakaj konoj de IHRA estas adekvataj por difino de politikoj kaj pritraktado de nuntempaj defioj surbaze de historiaj informoj;

14) deciditaj rememorigi tiujn, kiuj suferis, kaj strebi por pli bona estonteco, ni petas la internacian komunumon kunhavi nian penson:

*Mondo, kiu memoras Holokaŭston*

*Mondo sen genocido.*

Internacia Alianco por la Memoro de Holokaŭsto unuigas registarojn kaj spertulojn por plifortigi, antaŭenigi kaj akceli edukadon, memorigadon kaj esploron pri Holokaŭsto en la tuta mondo. ■



# Intervujo



LL - Ni legis plurloke, ke vi estas denaska Esperantisto.

Kio instigis viajn gepatrojn al tio?

Kia travivaĵo tio estis por vi?

Mi ja naskiĝis en esperantista familio, tamen mi ne parolis la lingvon kiel infano sed lernis ĝin kiel 15-16-jarulo.

Ambaŭ miaj gepatroj trapasis nur sesjaran elementan lernejon, kie oni tiuepoke ne instruis fremdan lingvon.

Tial ili lernis Esperanton por ekhavi "fenestron al la mondo", kaj poste ili

*Sten Johansson estas konata, fekunda moderna aŭtoro en Esperanto.*

*Li naskiĝis kaj vivas en Svedujo, kaj abunde tradukis kaj originale verkis - inkluzive por komencantoj.*

*Li estis premiita plurfoje en la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio.*

*Li produktas ankaŭ blogon pri literaturo.*

*Li tre malmulte movadumas.*

*Tamen, li konsentis respondi al niaj kelkaj demandoj per retmesaĝo.*

*Ni kore dankas.*

renkontiĝis en la loka klubo kaj enamiĝis.

Sekvis geedziĝo kaj infanoj.

Por mi ĉiam estis nature ke aperas eksterlandaj gastoj kaj ke la gepatroj vojaĝas al kongresoj.

Ĝuste pro planata familia vojaĝo al UK mi adoleske lernis la lingvon.

LL - Vi multe verkas, originale kaj traduke. Kiu estas la pli grava?

Ambaŭ same gravas.

Verki gravas al mi por vastigi la vivospertojn, ekspluati mian imagpovon kaj kreivon, esplori "kiel

estus se...", klopodi eniri la mensojn de aliaj homoj ktp.

Traduki por mi estas maniero tre intimiĝi kun ŝatata literaturaĵo kaj provi dividi ĝin kun aliaj homoj.

El lingva vidpunkto ambaŭ gravas – en iom malsama maniero – por evoluigi kaj stabiligi la lingvaĵon; aŭ tiel estus, se homoj legus la tekstojn kaj lasus sin influi.

LL - Laŭ via propra takso, kiu estas via plej bona originala verko?

La nun verkata!

Nu, senŝerce, el la eldonitaj, mi iom hezitas inter "Marina ĉe la limo" kaj "El ombro de l' tempo".

LL - Vi estas fekunda verkisto. Kion vi verkas en la nuna momento?

Romanon pri interhomaj rilatoj (amo, amikeco...) en bunta socia kunteksto de antaŭ kelkaj jardekoj.

Do, iasence mi denove reiras al mia junaĝo. Eble kliŝe, sed kion fari? Tamen temas ne pri membiografio.

LL - Bv klarigi al niaj legantoj, kio estas OLE (Originala Literaturo Esperanta).

Temas pri kolekto de informoj pri originalaj beletraĵoj libroformaj kaj ties aŭtoroj.

La plej granda parto estas kolekto el 1700 recenzoj pri tiaj verkoj.

Oni trovas ĝin ĉe:  
[esperanto.net/literaturo](http://esperanto.net/literaturo)

LL - Vi preskaŭ ne partoprenas en la ĝenerala Esperanto-movado (kongresoj, kluboj, grupoj). Kion vi opinias pri ĝi, nuntempe?

Nu, estas bone ke oni informas pri la ekzisto de Esperanto kaj organizas instruadon kaj renkontiĝojn.

Mi tamen bedaŭras ke oni neglektas la kulturen flankon kaj ĝenerale la eblojn praktike UZI la lingvon.

Mi mem de triona jarcento okupiĝas en Esperanto nur pri literaturaj aferoj. Ĉiu faru tion, kio interesas lin, ĉu ne? ■

# Papero Ne Kaŭzas Senarbarigon

**MANOEL MANTEIGAS DE OLIVEIRA\***  
(Esperantigis José R. Tenório)

Multaj homoj ankoraŭ surpriziĝas kiam ili malkovras ke fabrikado kaj uzado de papero kaj kartonoj kreskigas arbarojn kaj la kvanton da arboj. Ĉiuj scias ke papero estas farita el arboj. Ne ĉiuj scias tamen ke tiuj arboj estas plantitaj tiucele.

Same kiel oni plantas kotonon por fabrikado de ŝtofoj, aŭ kanon por produkti brulaĵon, tiel oni plantas arbojn por produktado de celulozo kaj papero. Se pliiĝos la konsumo de kotonŝtofoj, necesos pligrandigi la plantejojn por plenumi la kreskantan mendon. Se pliiĝos la konsumo de alkoholo, necesos planti pli da kanoj. Tiel same, se pli da homoj ekuzos paperon, pli da arboj devos esti plantitaj.

Kial necesas planti arbojn por produkti celulozon kaj paperon? Ĉu ne estus pli facile uzi la praarbojn, kiuj jam ekzistas? Teorie eblas fari paperon el iu ajn vegetaĵo. Tamen, por ke la industria procezo estu efika kaj finance profita, la uzo de taŭgaj specioj estas deviga. Nepras ankaŭ ke la arboj estu kiel eble plej similaj. Garantii la provizon de ĝustaj arboj, kaj ĉiuj homogenaj, nur eblas se ili



estos plantitaj. Same kiam oni kuiras fazeolon: ne estas bona ideo miksi, en la sama kuirpoto, malsamajn variaĵojn aŭ pli freŝajn grajnoj kun malpli freŝaj.

En Brazilo, la arboj plej uzataj kiel kruda materialo por celulozo kaj papero estas unuarange eŭkaliptoj kaj duarange pinoj. Eŭkalipto estas denaske aŭstralia kaj pino usona. Ne ekzistas tiaj specioj en la brazilaj praarbaroj. Tiuj arboj kreskos ĉi tie nur se ili estos plantitaj. Por kreski, ili forigas karbonon el la atmosfero, helpante mildigi la forcejan efikon kaj klimatajn ŝanĝojn. Nuntempe ni havas 2,7 milionojn de hektaroj da plantejoj de arboj por papero. Temas pri tri miliardoj da arboj, kiuj helpas plibonigi la naturmedion. Tiu areo estas tre malgranda: 0,32% el la enlanda teritorio, kaj malpli ol 1% el la areoj uzataj por kultivado kaj

bredado.

Papero estas intense recikligata. Laŭ Enlanda Asocio de Recikligistoj (portugale, ANAP), la reciklokvanto atingis 68,7% en 2018. Kaj kio ne estas recikligita, se ĝuste forĵetita en rubodeponejoj, tio kaŭzas minimuman median efikon, ĉar ĝi estas biodiserigebla.

Ne estas pruvoj pri tio ke ciferecaj komunikiloj estas pli bonaj por la medio. Elektronikaj aparatoj estas malfacile recikligeblaj kaj same pri ilia forĵeto. La komputejoj (la fama "nubo") konsumas grandegan kvanton da energio kaj nerekte respondecas pri granda eligo de CO<sub>2</sub>. Laŭ Universitato de Yale, tiaj komputejoj jam konsumas 2% el la tuta monda energio kaj tiu konsumo rapide kreskas. Krome, ili produktas tiom da CO<sub>2</sub> kiom la aviada sektoro.

Aliflanke, estas fortaj evidentajoj, ke papero estas ekologie pli daŭripova rimedo.

Malgraŭ tio, multaj entreprenoj proponas anstataŭigojn al papero per argumentado kiel "savi arbojn" kaj "protekti la medion", kiam envere ilia ĉefa celo estas redukti laborkostojn aŭ vendi siajn produktojn kaj servojn. Temas do pri trompa reklamo, kiu uzas falsajn mediajn argumentojn, angle konatajn kiel "greenwashing". La vero tamen estas ke papero produktas arbarojn!



(\*) teknikestro de la brazila filio Two Sides (<https://twosides.org.br>).

Fonto:

[www.fespabrazil.com.br/pt/noticias/artigo-papel-nao-desmata](http://www.fespabrazil.com.br/pt/noticias/artigo-papel-nao-desmata) ■




# Ruy Castro kaj Esperanto

PAULO SÉRGIO VIANA

La apezata  
brazila

verkisto Ruy  
Castro, aŭtoro de  
bonegaj biografioj  
kaj sukaj ĵurnalaj  
kronikaĵoj,  
publikigis en la jaro  
2019, pere de  
Eldonejo  
Companhia das  
Letras, la volumon  
“Metropolo ĉe  
Maro - La moderna  
Rio de la jaroj post

1920”. Temas pri la kultura formiĝo  
de Rio-de-Ĵaneiro, amplekse  
dokumentita kaj ĝuige redaktita. Oni  
legas malpeze kaj bone komprenas,  
kiel formiĝis la unika spirito de tiu  
urbo. Por tio, la aŭtoro prezentas  
multenombrajn faktojn kaj  
homfigurojn, kiuj kontribuis al tio:



Unu el tiuj  
figuroj, en jaro  
post 1920, la  
anarkiisto  
konvertita al  
komunismo  
Astrojildo Pereira,  
estis montrita en  
la jena segmento,  
je la paĝo 128, ĉar  
li faris la  
sekvantan  
deklaron:

“... same kiel tio  
okaziĝis en Rusujo  
(anarkiismo estos) tiel sensignifa kiel  
esperantismo kaj vegetarismo”.

Kaj Ruy Castro tuj aldonis:

“Astrojildo eraris je unu punkto:  
esperantismo kaj vegetarismo neniam estis  
sensignifaj.”

Brila Ruy Castro! ■

# Printempo en la Aŭtuno: Ĉu Naiva Amrakonto?

RITA DE MORAIS

*Printempo en la aŭtuno*, verkita de Julio Baghy en 1931, prezentas al leganto “...la historieton de dolĉe melankolia renkonto” inter Eva, kiu apartenas al cirko de majstro Baltazar, kaj la studento Adamo. Laŭ la verkisto, ĝi estas dediĉita al ĉiuj, kiuj “jam renkontis la printempon, kiu kisis neforgeseblajn rememorojn je la koro”. (p. 1).

Preskaŭ ĉiuj recenzoj, kritikoj rilate al *Printempo en la aŭtuno* parolas pri *romantika, sentimentala, tre simpla, eĉ naiva* verko. Laŭ la recenzistoj/kritikistoj la aŭtoro verkis tre romantikan, simplan romanon pri la unua amo inter geknaboj.

Ĉu *Printempo en la aŭtuno* temas pri amo? Ĉu ĝi estas romantika verko?

La respondo certe estas jes. Sed ĉu ĝi estas vere tiel simpla kaj naiva, kiel ĝin legis kelkaj famaj legantoj? La libro de Baghy prezentas, fakte, pli profundan temon.

Al tiuj, kiuj kritikis la verkon ĉar ĝi estas tro romantika, Julio Baghy saĝe respondas, ke kiam vivo elmontras ion ege home bela, tiam ĝi estas nomata “romantika”, iom moke, iom ironie kaj ofte por kaŝi emociion. Romantikismo, li asertas, estas la kosmetiko per kiu oni povas beligi la

mondon de la mizeruloj, alporti al ĝi pli da senco.

En *Printempo en la aŭtuno*, sociaj kaj intelektaj diferencoj aperas kiel barilo al geedziĝo, kaj estas la komedianto Baltazar, kiu malfermas la pordon al realaĵo, atentigante Fridolin, la arlekenon, pri la neebleco de eterna amo inter la geknaboj Eva kaj Adamo. Laŭ Baltazar tiu amo estas vana revado ĉar komediantino havas sorton nur en foira tendo; Laŭ li, “al instruitulo konvenas fraŭlina moŝto kaj ne edukitino de komediantoj. Jen la vero. La romantikon elcerbumis nur la romanverkistoj”. (p. 57). Ankaŭ Fridolin montras antaŭjuĝon kontraŭ la gimnaziano, kredante, ke li povos “delogi ŝin, vundi ŝian puran koron kaj per belaj frazoj ekposedi ŝin kaj poste forlasi por ĉiam”. (p. 58). Tiel, la socia diferenco okupas gravan pozicion en la romano kaj respondecas pri la neebleco de la unuiĝo de la paro.

*Printempo en la aŭtuno* rilatas al amo/*eros*, ne al la vulgara sed al la ĉiela, spirita amo inter geknaboj: “...lian arbaran feineton, tiun senpekan knabinecon, tiun... tiun sanktulinion.” (p. 57). Tiel pensas la knabo pri la knabino amata de li. Sed

se la titolo invitas onin al ĝojiga legado kaj espero pri eterna amo, kaj lulas la legantojn per iluzio de eterna printempo, tiu iluzio senfortiĝas laŭmezure kiel ili enprofundiĝas en la legado, ĉar la aŭtoro, malgraŭ sia kredo pri la amo, vere montras, ke socio kaj individuo ordinare marŝas en malsama direkto; revuloj ne plaĉas al socio. Krome, kaj pli forte, montras la verko pere de la komediante Baltazar, ke vivo estas ŝajno: "...dirante al ili [al la publiko]: kreu la nekredeblan, etendu la manojn al la neatingebla kaj kirasu vin per la plej bela *ŝajno*<sup>1</sup> de via songovojo — per la *amo!*"<sup>2</sup> Do, laŭ li amo estas ja parto de ŝajno, de iluzio. Malgraŭ tio, li laŭdegas la amon: "...estu fanatikoj de la amo (...) estu la suverenoj de la amo, (...) estu amantoj de la amo, ĉar tiam vi banos vin en la fonto de la ĉiama juneco, gajnos la iluzion pri la eterna vivo". (p. 65).

La rakonto, kvankam dum kelka tempo lulas la leganton per varmaj vortoj, subite ĵetas lin/ŝin sur la krudan realaĵon: la masko falas aperigante la veran vizaĝon; Baltazar aldonas: "Nu, kaj post tiom da belaj sentencoj mi forigus mian maskon, montrus al ili mian milsulkan vizaĝon, blankajn harojn [...], ili aerskue ridegus, ĉar la ŝajno estas la suvereno de la mondo" (p.66). Do, la laŭdo de Baltazar pri amo estas ankaŭ ŝajno, ĉar li ne kredas pri ĝia

ekzisto; li iom ironie, iom pesimisme parolas pri ĝi kaj vere ne kredas pri la amo inter viro kaj virino: "(...) Kaj poste (...) vi avertus ilin: estu singardaj, amu la amon pro la amo kaj ne pro la amata persono, ĉar tiam vi fariĝos la almozuloj de la amo kaj la pano el almozula sako estas saturita de larmoj" (p. 66).

La *ŝajno* kaj la *masko*, kiuj kaŝas la realon, havas gravegan rolon en la rakonto, ĉar ili evidentiĝas la hipokritecon de socio, de homaj rilatoj, kaj krom tio ili estas la zorgantoj de la revuloj, ili kaŝas al revuloj la krudan vidon de maljuneco kaj de morto. La romano konstante moviĝas inter la *ŝajno* kaj la realo. *Ŝajno* estas vere la gvidmotivo (*Leitmotiv*) de la romano kaj tiu vorto, aŭ pli bone, tiu ideo estas ripetata laŭlonge de la teksto, preskaŭ ĉiam elparolata de majstro Baltazar. Oni rimarkas do, ke la granda temo, la grava diskuto alportata al leganto pere de la romanfiguro Baltazar estas, ĉu la homa vivo, la homa konduto, eĉ la amo, estas nur ŝajno: "Grava estas sole la ŝajno!"; "(...) Ĉu *ŝajno* estus ankaŭ la amo, la feliĉo, kaj ŝajno tiu sopiro, kiu pelas la junajn geamantojn unu al alia?"; "(...) Ĉu vi komprenas do kia ŝajno estas la vivo?" Tiuj citaĵoj montras, kiel gravas la temo de la ŝajno en *Printempo en la aŭtuno* kaj kiel riĉa estas la verko de Julio Baghy. Estas vere filozofia diskuto pri la vivo, pri

la homo. Preninte ŝajne banalan temon, Julio Baghy verkis riĉan, belan, ege esplorindan romanon, plenan je simboloj kaj filozofiaj diskutoj. La kvar ĉefaj romanfiguroj reprezentas du generaciojn, du momentojn de la vivo: junaĝon (Eva kaj Adamo) kaj maljunaĝon (Baltazar kaj Fridolin). Ili reprezentas ankaŭ la *printempon* (la junaj): metaforon por amo, espero, revo, junaĝo kaj vivo, kaj la *aŭtunon* (la maljunaj): metaforon por senespero, maljunaĝo kaj morto.

---

1

2

Ĉu naiva amrakonto? Ĉu simpla verko pri la unua amo inter geknaboj? Tute ne.

La titolo de la libro promesas al leganto gajan kaj dolĉan legadon, sed ĝi estas nur ŝajno. La titolo vere kontrastas kun la sento kaj la amara filozofio pri vivo kaj amo montrata de la verkisto.

## BIBLIOGRAFIO

Baghy, Julio. 1931. *Printempo en la aŭtuno*. Germanujo: Heroldo de Esperanto.

Kökény, L; Bleier, V. 1979. *Enciklopedio de Esperanto*. v.1. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio.

Lapenna, Ivo. (ĉefe redaktoro). 1974. *Esperanto en perspektivo: faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Platão. 1991. *Diálogos: O Banquete – Fédon – Sofista - Político*. 5-a eldono. São Paulo: Nova Cultural.

Sutton, Geoffrey. 2008. *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887-2007*. New York: Mondial. ■



# Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

## Demando

En bonaŭtoraj tekstoj oni trovas foje akuzativon post la prepozicio *po*, foje ne. Kiu estas la kriterio?

Ĉu oni devas diri: *Mi legos po tri paĝoj el la Biblio en ĉiu mateno (aŭ po tri paĝojn)? Ĉiu lando indikos po du delegitoj (aŭ po du delegitojn) por la konferenco?*

## Respondo

Koncize: konforme al la stilo Zamenhof-a kaj al la *Fundamento* oni ne uzu akuzativon post *po*. Tamen kelkaj modernaj aŭtoroj ĝin uzas, kaj modernaj gramatikistoj ĝin akceptas aŭ eĉ rekomendas. Mi persone preferas sekvi la klasikan uzadon. Por pli detala respondo, legu la ceteron.

La supra demando fontas el la dubo, ĉu *po* estas prepozicio aŭ adverbo. Se *po* estas prepozicio, tiam oni ne rajtas uzi akuzativon; sed se *po* estas adverbo, kiu rilatas al sekvanta numeralo, tiam oni devas uzi akuzativon.

Mi sukcesis trovi nur du ekzemplojn, en kiuj Zamenhof uzis akuzativon post *po*. La unua estas tre frua: *Al ĉiu el la laborantoj li donis po kvin dolarojn.* (**Dua Libro de l' lingvo Internacia**, 1888).

Zamenhof iom hezitis dum la fruaj tempoj de Esperanto. Kvankam akceptante la uzadon de akuzativo post *po*, tamen li jam frue konsilis ne uzi akuzativon:

*Inter la esprimoj “doni po 2 pecojn” kaj “doni po 2 pecoj” estas ankoraŭ malfacile diri, kiu estas la pli bona, kaj tial ambaŭ esprimoj estas uzablaj kaj bonaj. Tamen konsiderante, ke danke la intervenon de la vorto “po” la “pecoj” jam ne dependas rekte de la “doni”, ni konsilas uzi post “po” (tiel same kiel post “da”) la nominativon (“doni po 2 pecoj”). Alia kaŭzo por tiu ĉi konsilo estas ankaŭ la cirkonstanco, ke laŭ nia opinio “ĉe, kie oni dubas inter la nominativo kaj akuzativo, oni devas uzi la nominativon”.* (*La Esperantisto*, 1891)

Aparte gravas la du ekzemploj troveblaj en la *Fundamento*:

*Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.* (**Ekzercaro**, 1905)

Jen kelkaj pliaj ekzemploj:

*Tial mi proponas: ni lasu nur po unu partícipo aktiva kaj pasiva [...]; [...] ĉiu folio (16 paĝoj) koston po 25 centimoj [...]* (**Pri Reformoj en Esperanto**, 1894)

*[...] mi imposte devigos, ke li liveru po tri pudoj da vakso.* (**La revizoro**, 1907)

*[...] ili ricevis po kvin pomoj [...]; [...] la drapo koston po 2 spesmiloj por metro [...]* (*Lingva Respondo* 42, 1908)

*Ĉiu ŝargis kvin paroĵn da pistoloj kaj krom tio ĉiu ŝargis po tri karabenoj.* (**La rabistoj**, 1908)

*“Ŝi havis sur ĉiu mano po kvin fingroj; [...]”* (*Fabeloj de Andersen* 2, 1916)

[...] tial ilia patro donis al ĉiu el ili **po** unu bela ĉevalo; [...] (Fabeloj de Andersen 3, 1916)

Kaj el ĉiuj vivaĵoj, el ĉiu karno, enkonduku **po** unu paro el ĉiuj en la arkeon, [...]; [...] tiam ni donos al vi ĉiu **po** mil kaj cent arĝentaj moneroj. (Malnova Testamento, 1916)

Multaj similaj ekzemploj troviĝas en la verkaro de Zamenhof. Tamen ekzistas dua ekzemplo lia pri akuzativo post *po*:

Jen estas la fajrofero, kiun vi devas alportadi al la Eternulo: ŝafidojn jaraĝajn sendifektajn **po** du en ĉiu tago, kiel konstantan bruloferon. (Malnova Testamento, 1916)

Eble pro la nekutima vortordo kaj por plia klareco li preferis uzi akuzativon en la ĉi-supra ekzemplo.

Ankaŭ Kabe ne uzis akuzativon post *po*; ekzemple:

[...] la kolombetoj elpikis al ambaŭ **po** unu okulo. (Fratoj Grimm – Elektitaj Fabeloj, 1906)

Aŭ kiaj pastroj, kiuj ŝajnigante piecon kaj sobrecon, havas **po** dek virinoj, [...] (La Faraono, 1907)

Ĉe kelkaj pli modernaj verkoj ja eblas trovi ekzemplojn pri akuzativo post *po*:

Kaj mi, malfermante ĝian fermoplaton, donis al ĉiu **po** unu pecon. (Vojaĝo al Kazobinio, Szathmári, 1938)

Dora estas la sola persono en la mondo, kiu provis kuri pli rapide ol **po** 335.000 kilometrojn en sekundo, [...] (Kredu min, sinjorino! Rossetti, 1949)

[...] Graf, Romian kaj Plum havis **po** unu tekon, [...] (Ĉu ni kunvenis vane? Piron, 1982)

[...] tiajn antaŭajn korbatojn mi havis **po** almenaŭ dek. (La Majstro kaj Margarita, fragmentoj, Pokrovskij, 1991)

Aliaj kamparanoj devis pagi semajne **po** dudek, dudek kvin, tridek frankojn. (La Mortula Ŝipo, Kaiser, 1995)

Poste ŝi prezentos al ni **po** unu floron [...] (La Ŝtona Urbo, Löwenstein, 1999)

Por fini, mi citas el Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, kie Bertilo Wennergren asertas la jenon:

Pri **po** oni tamen povas agi laŭplaĉe. Pro la Zamenhofs kaj Fundamenta uzo restas ĉiam regule uzi **po** kiel rolmontrilon de la posta esprimo. Oni do povas ĉiam forlasi N post **po**. Tio iajfoje povas esti konfuŝokrea (ekz. kiam mankas N-finaĵo ĉe objekto).

Aliffoje tio estas eleganta. Oni povas ankaŭ ĉiam uzi **po** kiel nuran nuancilon almetante ĉiam la bezonatajn rolmontrilojn. Tio estas tre klara, sed iajfoje povas esti iom peza. Apenaŭ havas sencon disputi pri tio, kiu el la du uzoj estas preferinda. Praktike ambaŭ bone funkcias.



# La Preĝo de la Maizo

(Cora Coralina, esperantigo de James Rezende Piton)

Enkonduko al la Maizo-poemo

Sinjoro, mi neniom valoras.

Mi estas la humila planto de la malgrandaj kortoj kaj la malriĉaj kultivejoj.

Mia grajno, hazarde perdita,

ĝermas kaj kreskas en la grundo, neflegata.

Mi elmetas foliojn kaj tigon kaj, se vi helpos min, Sinjoro,

kvankam hazarda planto, soleca,

mi donas spikojn kaj redonas per multaj grajnoj

la komencan perditan grajnon, mirakle savitan,

kiun la tero fekundigis.

Mi estas la primara planto de la kultivejo.

Ne apartenas al mi la tradicia hierarkio de tritiko,

el mi oni ne faras la universalan blankan panon.

La Justulo ne konsekris min Vivopano, nek oni donis al mi lokon en la altaroj.

Mi estas nur la forta kaj fundamenta nutraĵo de tiuj, kiuj prilaboras la teron, kie ne ĝermas la nobla tritiko.

Mi estas de malklara deveno kaj malriĉa heredo,

nutraĵo de kruduloj kaj jungitaro.

Kiam la dioj de Helenujo kuris tra la arbaroj,

kronitaj de rozoj kaj spikoj,  
kiam la hebreoj iris en longaj karavanoj  
serĉi en Egiptujo la tritikon de la faraonoj,  
kiam Rut kantante postrikoltis en la kultivejoj de Boaz  
kaj Jesuo benis la maturajn tritikejojn,  
mi estis nur la manĝaĵo de la amerikaj indianejoj.  
Mi estis la densa kaj konstanta maizokaĉo de la sklavo laca pro la kultivejo.  
Mi estas la malfajna kaj modesta maizokuko de la malgranda bienulo.  
Mi estas la malmultekosta faruno de la proletaro.  
Mi estas la polento de la enmigrinto kaj la panero de tiuj, kiuj komencas la  
vicon en fremda lando.  
Nutraĵo de porkoj kaj de la malĝoja ŝarĝobesto.  
Kiu min plantas, tiu ne starigas komercon nek arigas monon.  
Mi estas nur la malavara kaj senzorga abundeco de la spikejoj.  
Mi estas la plena kripo de kie remaĉas la grego.  
Mi estas la festkanto de la kokoj en la gloro de la mateniĝantaj tagoj.  
Mi estas la gaja bleko de la ovellasaj kokinoj ĉirkaŭ ties nestoj.  
Mi estas la vegetala malriĉeco dankema al Vi, Sinjoro,  
kiu faris min necesa kaj humila.  
Mi estas la Maizo.

(\*) Cora Coralina, ps. de Anna Lins dos Guimarães Peixoto Bretas (1889-1985), estis brazila verkistino kaj poetino, kiu havis sian unuan libron publikigita nur kiam ŝi estis pli ol 70-jaraĝa. Dolĉistino en la landinterno de Brazilo, la temo de ŝiaj poeziaĵoj kaj rakontoj estis ĉiutagaĵoj de la etaj stratoj de ŝia naskurbo kaj ĉirkaŭaĵoj.

ANNA LOBO

PRI KINO KAJ ALIAJ ARTOJ

## LA DU PAPOJ

Origina nomo: The two popes

Direktoro: Fernando Meirelles

Aktoroj: Dan Lin, Jonathan Elrich kaj Tracey Seaward

Lando: Usono, Britio kaj Italio

Lanĉo: 31.08.2019

Tempodaŭro: 2h 05min



Antaŭ nelonge mi spektis tiun ĉi filmon. Mi trovis ĝin tiom interesa ke mi volis kundividi ĝin kun vi. Ĝi estas unu el la novaj filmoj de Netflix, kiu rakontas pri la historio de du papoj - Francisko kaj Bento XVI.

Bazite sur veraj okazaĵoj, ĝi montras iom pri kiel estis la kunsido por elektu la novan Papon post la forpaso de Johano Paŭlo II, kiam Bento XVI estis elektita. La argentinano Bergoglio tiam ankaŭ estis tre bone voĉdonita. Sed malgraŭ tio, ambaŭ havis tre malsamajn ideojn pri kiel oni devas regi la eklezion.

La filmo do fluas ĉefe sur tiu malsameco de ideoj inter la du. La beleco pri kiel ambaŭ komunikigis kaj sen juĝo pri la vidpunkto de la alia, kiu poste malfermis novajn eblecojn al la rilato.

Ankaŭ estas tre kontuŝe rakontita la juneco de Papo Francisko, kiel li eniris en la eklezion kaj kio okazis en lia vivo dum la diktaturo en Argentino. Sendube ĝi estas tre bone direktita, kaj allogas ĉiujn tra la scenoj ĝis la fino.

Mi persone ne ŝatis kiam Bento XVI estis ĉe la povo de la eklezio. Antaŭ ol spekti ĝin, mi vere dubis ĉu ĝi ja tiom bonas kiel oni diras. Sed ĝi montiĝis kiel unu el la plej ĉarmaj kaj kortuŝaj filmoj kiujn mi spektis. Cetere, la aktoroj kiuj rolas la papojn estas perfekta! Eĉ fizike tre similaj.

Mi esperas ke tiu ĉi teksto inspiris vin spekti la filmon! Ĉu vi pretas eniĝi en unu el la plej interesaj momentoj de la kristana eklezio? Bonan spektadon al ĉiuj! ■

# Sveda Novelaro

PAULO SÉRGIO VIANA

Eldono SAT 1985

(Unua eldono en 1950, fare de Sveda Laborista Esperanto-Asocio)

Pluraj aŭtoroj; esperantigis Ferenc Szilágyi.

**K**iam mi vidis ĉi tiun senornaman broŝuron en la biblioteko de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, tiam kaptis mian atenton precipe la nomo de la tradukinto. Mi eklernis Esperanton, en la jardeko post 1960, kaj mia instruisto uzis lian metodon “Curso Prático de Esperanto”, kiu tiam iom furoris en Brazilo. Poste mi eksciis, ke la hungaro (migrinta en Svedujon) Ferenc Szilágyi estas mem bonstila verkisto kaj tradukisto, kiun oni konsideras vera klasikulo en Esperanto. Antologio de svedaj rakontoj tradukitaj de li do tuj allogis min.

Tamen, la kolekto konsistas el tiel bonaj tekstoj, ke mi ravite ĝuis ankaŭ la enhavon de la noveloj. Mi povas diri, ke kelkaj el ili estas veraj majstroverkoj de nelongaj rakontoj. Estas sciate, ke skribado de tiaj literaturaĵoj postulas tute alian talenton, ol kiam oni produktas romanon aŭ dramon. Ĉi tie, la tuta intrigo devas disvolviĝi relative

rapide, kaj tamen kun sufiĉe da streĉo, por ke la leganto avide soifu veni al la surpriza fino. Ne facila tasko. Sed en ĉi tiu antologio, mi povas aserti, ke la organizinto elektis bonegajn, modelajn novelojn. Jen kroma merito por la tradukinto. Enestas dudek verkoj, kaj ĉiuj impresas freŝe, patose, emociige, pensige kaj tute originale. Kaj en Esperantaj vestoj tiaj, ke oni forgesas, ke ili estas tradukaĵoj.

Speciala ĉarmo en la libro troviĝas en la fakto, ke ĉiuj aŭtoroj estas prikomentataj de la tradukisto per duonpaĝa eleganta prezento. Kaj ĉiuj devenas de la laborista klaso, tiel ke oni konsideras la libron “proleta literaturo”. Kompreneble, ili naskiĝis kaj ekverkis en la fino de la 19-a jarcento, kaj komenco de la 20-a jarcento, kiam socialismaj ideoj estis tre fortaj en Eŭropo. Eĉ Szilágyi ne kaŝas sian simpatian al ili. Kaj tio klarigas, kial Sennacieca Asocio Tutmonda interesiĝis pri reeldonado de la Sveda Novelaro. Mi ne scias, ĉu ĝi estas ankoraŭ aĉetebla en la ordinaraj Esperantaj libroservoj. Se jes, mi forte rekomendas ĝian legadon. Se ĝi estas elĉerpita, mi opinius tre valore, se oni reeldonus ĝin en moderna vesto, eble kun aktuala enkonduka prezento. ■

# LA BLUA SONGÔ



J. M. Progiante



Autor: J. M. Progiante  
Editora: Esprima, 2019  
Formato: 19 cm, 60 páginas

Capa dura com ilustrações coloridas

Sequência do livro “La malbeno de Tarumo kaj Nurana” com os personagens reunidos, agora na Bélgica, para solucionar um novo mistério envolvendo o roubo de um diamante.

Preço: R\$ 39,00

EM VENDA EM  [esprima.org.br/butiko](http://esprima.org.br/butiko)



# Paroliga Rondo

Ĉiun sabaton matene  
ekde marto 2020!

